

Amerika Esperantisto

American Esperantist

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

Published Monthly by

THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY (Inc.)

WEST NEWTON, MASS.

ONE DOLLAR A YEAR Eksterlande \$1.25 (Sm. 2.50) SINGLE COPY TEN CENTS

Mallongaj verkoj, tradukaj kaj novaj ĉiam prefere akceptitaj. Oni ne resendas neakceptitajn manuskriptojn, se la sendinto ne kune sendis la resendpagon. La Redakcio konservas por si la rajton korekti manuskriptojn laŭbezone.

Oni donos la preferon al manuskriptoj skribitaj skribmaŝine.

Vol. 16

September, 1914

No. 1



EL LA REDAKCIA SANKTEJO



Je ĉiu flanko, oni diskutis nur unu temon—La Terurega Milito. Al ni Esperantistoj, la sorto de niaj milionoj da samideanoj en malfeliĉa Eŭropo, la disigado de nia Deko, kaj la rezulto al la propagandado de nia afero kaŭzas ke ni sentu specialan intereson pri ĝi. S-ro H. W. Hetzel, delegito el Pennsylvania al la Deko, skribas: "La Palaco Gaumont povas enhavi 5000 sidantojn; pli ol 4000 Esperantistojn pagis siajn kotizajojn sed ne pli ol 200 ceestis la dimanĉan kunsidon, kiun mi ankaŭ ceestis. Mi preskaŭ ploris vidante tian kompletan ruinaĵon!..." Brita samideano skribas ke la vagonaro de la majstro, vojaĝante Parizon, estis haltigita en Germanujo, kaj la Rusaj vojaĝantoj estis forsendataj al difinitaj gardejoj. Pli

malfrue, oni sciigis ke D-ro Zamenhof revenis nedefektite al Warsaw.

Rakontetoj kaj aventuroj de la Esperantistoj sendube daŭrigos alveni al ni pli kaj pli rapide. Kvankam, kiel diras S-ro Hetzel—oni povas preskaŭ plori je la ruinigado de la plej granda internacia kongreso kiun la mondo jam konis, tia agado ne helpas nian aferon en la nuna krizo. Ni Amerikanoj havas antaŭ ni devon—sanktan devon—al la Esperanta Movado, al niaj kompatindaj alilandaj samideanoj, —batalantaj frato kontraŭ frato—kaj al ni mem. La devo estas la antaŭenpuŝado kaj propagandado de nia afero kiel neniam antaŭe en nia historio. Kore ni ehas la sentojn esprimitajn de S-ro Jos. Siegel el Cincinnati, Ohio, kiu skribas jene:

ALVOKO AL USONAJ ESPERANTISTOJ.

La Eŭropa milito estas terurega sortbato kaj malhelpo kontraŭ nia sankta afero. Inter la usona samideanaro ekzistas sendube multe da timkoruloj kaj seniniciativuloj, kiuj en la nuna krizo pensos, aŭ jam estas pensinta: "Ho ve! La esperantismo perdiĝos; la eŭropaj samideanoj estas grandnombre devigataj militservi, kaj aroj da ili mortas. Kaj la milito mem estas gravega indiko ke la jarlongaj klopodoj de la tutmonda esperantistaro ne faris impreson sur la registaroj rilate al la paccelo. Bedaŭreginde, tre, tre! Sed mi ne havas la povon plibonigi la aferon; ni usonaj esperantistoj nur povas atendi senmove la eventualan rezulton. La movado sendispute ricevos malantaŭenpuŝon de kelkaj jardekoj, sed kion ni povas fari? Tute, tute nenion. Plie, la afero sin ne koncernas pri mia ĉiutaga nutrado aŭ bonsano; tial mi min ne plu ĝenos pri ĝi". Jen la pensoj de la ŝanceliguloj, la plasmokruruloj.

Permesu ke mi diru al vi, karaj ĉilandaj samideanoj, ke ni povas fari multe, ja multege! Se tuta Eŭropo estas en tumulto kaj bruo, ĉiu povas senpene kompreni ke tio grave difektos nian aferon tie. La movado konfuziĝos, multe da diversaj grupoj senestriĝos kaj disiĝos. Kie antaŭ la militkomenco ekzistis dek grupoj, tie, post kiam levigis la pulynuboj, sin trovas nur tri aŭ kvar. Konsiderinte tiujn ĉi malĝojajn kaj preskaŭ senesperigajn faktojn, ĉiu vera Esperantisto en Usono tuj eksentos la neceson multe plifortikigi, kaj mi eĉ povas diri, plejperfektigi la usonan organizacion. Ĉiu devas sin senti kiel varbulon, kaj varbi novajn rekrutojn, por ke, spite la teruran malpligrandigon de nia anarlisto en Eŭropo, la tutmonda Esperantistaro ĉiam konservadu preskaŭ la saman nombron de anoj. La alvoko estas al vi, kara samideano; ne lasu la laboron al via kunulo, al via frato, aŭ al la grupo en la proksima urbo. Vi mem devus esti vicia varbanto. Se vi en la pasinta tempo ne multe klopodis pri la kreskado de la Esperanto-mova-

do, komencu nun. Ne estas tro malfrue! Male, la tempo estas ĝuste matura. La sankta afero bezonas vian helpon! Se ĉiu Esperantisto en Usono altiros nur unu personon al la movado, nia nombro duobliĝos. Pri pensadu tion! Kaj multaj el ni facile povas gajni tri aŭ kvar novajn membrojn. La propagando jam ne estas malfacila, dank' al la granda reklamo kiun donis al nia afero la Chicago Kongreso, kaj la ĉiamaperantaj artikoloj en la tagjurnaloj kaj naciaj gazetoj, ĉiuj konas kelkajn faktojn pri nia lingvo, kaj jam ekzistas en la pensoj de multaj neesperantistoj, firma kaj tute logika bazo sur kiu oni povas starigi argumenton. Eble estos necese ke vi alparolu tri personojn senrezulte, kaj la kvara aliĝos. Se nur la kvina aŭ la sesa aliĝos, eĉ tiam ne senkuragiĝu, ĉar via laboro estas riĉe rekompencita. Se vi estas izolita Esperantisto, eble la sola en via urbeto, ne dormadu ĝis kiam vi estos stariginta almenaŭ grupeton. En la granda urbo Cincinnati mi laboradis senĉese dum du jaroj sen ia rezultato. Sed mi povis atendi; mi laboris kaj atendis. Nun ni havas sufiĉe kontentigan grupon tie ĉi, kaj mia laboro estas grandmaniere rekompencata. Tio ne signifas ke ni nun permesas al ni ripozon sur la laŭroj! Tute ne. "Ĉiam laboradu" estas nia devizo. Ne forgesu ke "En unueco troviĝas forteco". Se vi havas grupeton de tri aŭ kvar anoj, kiuj laboras kune harmonie, ĉu tio ne superas laŭ graveco la individuajn klopodojn de ĉiu el ili? La respondojn vi scias. Se vi jam estas grupano, proponu la enkondukon de nova kaj energia propagandagado.

Same kiel la tuta mondo sin turnas al Usono kaj atendas de ĝi packonservadon kaj perecon en la nuna grava militkrizo, tiel same pensas la Eŭropaj samideanoj pri ni rilate al nia lingvo; tiel same tiuj atendas de ni la konservadon kaj la DISVASTIGON de nia ideo.

Jos. E. Siegel,
 Prez., "The Cinti. Esperanto Society".

THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA

Central Office, Newton Centre, Mass. C. H. Fessenden, Sec.

DIRECTORY

President

J. D. HAILMAN
310 So. Lang Ave.
Pittsburgh, Pa

Vice President

DR. B. K. SIMONEK
1669 Blue Island Ave.
Chicago, Ill.

Secretary-Treasurer

DR. C. H. FESSENDEN
Newton Centre, Mass.

Special Propaganda Fund

REV. J. H. FAZEL
724 Taylor St.,
Topeka, Kans.

Chairmen of Committees

Publications

ERNEST F. DOW
West Newton, Mass.

Examinations

HERBERT HARRIS
10 Henry St.
Portland, Me.

Propaganda

WM. H. HUSE
97 Mammoth Road
Manchester, N. H.

Educational Director

PAUL M. SCHUYLER
Pickford, Mich.

OFFICIAL COMMUNICATIONS

Esperanto and the European War

Like a thunderbolt from the clear sky comes the news of a conflict of nations which bids fair to be more general and more bloody than any war in the world's history. It brings sadness to us as a nation but its horrors are brought home more closely to those of us who have been Esperantists during the past eight or ten years. In that time we have become acquainted personally and by correspondence with hundreds of individuals of all the nations involved in the present struggle. There has grown up between us a true family relation and an appreciation of the true meaning of the brotherhood of man.

The avowed neutrality of our country is with us a real neutrality. Our close friends are to be found in every one of the warring factions and our

sympathy must of necessity be with all.

What part will Esperanto play in this great struggle? Its first accomplishment is already being revealed to us. This outbreak occurred on the eve of the tenth international congress in Paris and found many delegates from all nations stranded in that city, or on their way there.

Even at this early date we are receiving news of protection and shelter to our American delegates, in France, Germany, Switzerland and Great Britain and the final and full report of these incidents will reveal a friendliness unknown to any but the real Esperantists. What is true of our own fellow countrymen will be true of those of all nationalities, for in Esperantism there is a true super-

nationality. A prominent Esperantist and business man recently said "If I were in Europe today I would rather have a membership card of an Esperanto Association than an American passport and a pocket full of letters of credit." This is a strong statement, but is it not a true one? Comfort and safety in Europe today are not commodities to be bought. The rich as well as the poor are stranded and equally helpless.

Esperanto in Europe is essentially the language of the masses. A large proportion of those who know it, who use it and who are filled with the spirit of tolerance and fraternity which always goes with it are the men and youth of the several nations which are struggling for the supremacy. Undoubtedly they will meet, on the battle field, in the prison and in the hospital. National pride will yield before humanity and the fraternity of Esperantism and we shall be able in the future to record deeds of heroism, self-sacrifice and kindness which could have come from nothing else in the world than the brotherhood which has existed among Esperantists for the last twenty-five years and which is becoming firmer every day. The few thousands of dollars which have been spent for Esperanto propaganda will do more to avert the horrors of war than the millions which have been spent toward the promotion of universal peace. Peace is an abstract ideal; Esperantism is a spontaneous and living reality. Peace is the distant goal to be attained; Esperantism is the accomplished fact.

Disturbed conditions on the Continent are bound to halt the triumphant progress of our propaganda, for many of our propagandists are in the field. However, the object lesson which this war will furnish will demonstrate conclusively the indirect advantage toward universal peace and universal toleration, which may be derived from common knowledge of a universal tongue which has already done so much to promote international understanding and international confidence among the pawns in the game. It is not beyond hope of possibility that in the future some of this spirit may be found in high places and help to prevent such a turning of nation against nation, for all time.

It is more than ever our duty as

members of our national association to safeguard the interests of Esperanto while our European samideanoj are otherwise engaged. There are in our midst tens of thousands of men and women from all nations of the world. Direct propaganda among these means indirect propaganda in the countries from which they have come. We in America may not need Esperanto as a language but we do need the underlying spirit which always accompanies it.

With the success of the Chicago congress behind us and the possibilities of the San Francisco congress before us we never were in a better position to promote our language and our ideals. Shall we each one of us resolve to do individual and effective work for Esperanto during the present year?

NECROLOGY

We received too late for publication in the last issue of the magazine, the sad news of the sudden death of Mr. Lewis B. Luders of Philadelphia, Pa., in Leipzig where he had gone in a vain pursuit of health. Mr. Luders was one of our most active and valuable pioneers. One of the founders of the Philadelphia Esperanto Society, he was for many years its successful president, and teacher of its classes. A short time ago, he was forced to give up all active work by reason of his impaired health, tho his unswerving loyalty to the cause remained undiminished. His wife was Jean Smith Munro of Edinburgh, Scotland, whom he met at an Esperanto Congress in Europe. On behalf of the Esperantistaro throughout the country, we extend our heartfelt sympathies to her in this bereavement, feeling keenly the loss in our own ranks of a true and devoted Esperantist.

Our sympathies also go out to Dr. D. O. S. Lowell, Headmaster of the Roxbury Latin School, Ex-president of EANA, and one of the best known Esperantists and educators in this country, whose wife departed this life during the past month. Dr. Lowell's many Esperantist friends through their official organ, express their condolences to him in his sorrow.

END OF OFFICIAL PART


TUTPACIFIKA ESPERANTA KONGRESO

Spite la fakton ke la tuta Eŭropo batalas, la Panama Pacifika Internacia Ekspozicio progresas rapide. La registaro ekspozicia opinias ke la eŭropa batalo ne havos malbonan efikon. Vere, ne ĉeestos tiel multe da fremdaj vizitantoj kiel se ne estus batalado, sed aliflanke, Usonanoj kiuj intencis iri al la malnova mondo sendube ŝanĝos siajn intencojn kaj "vidos Amerikon unue." Tial ni esperas ke eĉ se la eŭropa disputo daŭros, ne estos pli malmulte la nombro da vizitantoj ol venus en tempo paca.

La 635 akreoj rigardataj el diversaj vidpunktoj ŝajnas esti en furioza konkurado por la supereco en la ĉiel-

can influon en la kolorplano; pint-havaj turoj staras ĉie kiel gardantoj, kaj en la mezo de ĉiuj kreskas granda turo ŝtala kun alteco de 435 futoj. Tiu ĉi "Turo de Juveloj" briletos kiam la suno aŭ serĉlumoj brilos sur ĝi.

Ĉie estas agemeco kaj koloro. La brunaj montetoj trans la golfeto, la verdaj deklivoj de la Prezidio, la belaj bluaj akvoj de la golfeto, kaj la multaj koloroj de la nova San Francisko, kiu rigardas la Ekspozicion de sia naturo amfiteatro, provizas belegan kadron por la koloroj kiujn Jules Guerin ordonas ke mil pentristoj perfektigu.




La Palaco Hortikultura

linio. Grandegaj elmontraj palacoj kun Pompejruĝaj tegmentoj kovras 43 akreojn; la kupraverdaj kupoloj de la palacoj kaj la orangkoloraj kupoloj de la centra korto havas poten-

La vastaj florejoj kaj la bulvardejoj havas randojn el verdajoj kaj ŝajnas konduki al la kupolego de la Palaco Hortikultura ĉirkaŭata per Saracenaĵturotoj kaj belaj kreskaĵoj.

Dek el la dekunu elmontraj palaĉoj jam estas konstruitaj, kaj la Palaĉo de Belartoj, farita el ŝtalo kaj betono, estos preta post malmultaj semajnoj. Festa Halo, la laste komencita konstruaĵo, levigas siajn arkokajojn grandajn kun promeso de frua plenumo. La "Korto de la Kvar Sezonoj," granda laboro de Henry Ba-



La Korto de la Kvar Sezonoj

con, elpensinto de la "Lincoln Memorial," estas la unue preta el kvin kortoj. Eĉ sen la lokigo de siaj muraj pentraĵoj ĝi estas mirinda bildo kun siaj malpalaj koloroj, ŝaŭmantaj fontanoj kaj arbetoj florantaj.

Cie skulptaĵoj metiĝas, ĉie anĝel-egoj, elefantoj, rajdistoj, kaj militemaj gigantoj iras laŭ la deziro de ŝtalaj kabloj al siaj lokoj sur grandaj arkajoj, altaj turoj, aŭ niĉoj ŝirmataj.

La plejmulto el la naciaj partoprenantoj nun havas komisionojn tie ĉi por prepari iliajn elmontrojn kaj konstruaĵojn. Ni devas memori ke dum la ekspozicio en St. Louis, Japa-

no batalis kontraŭ Rusujo kaj samtempe havis bonajn elmontrojn kaj konstruaĵojn ĉe la ekspozicio. La nunaj kondiĉoj estas similaj. La plejmulto el la eŭropaj kaj aziaj nacioj intencas partopreni en nia Ekspozicio. Kvankam ili batalas, iliaj komisionoj jam estas tie ĉi kun la mono por prepari la konstruaĵojn, multaj el iliaj elmontroj estas nun ĉe la Ekspozicia loko, kaj aliaj jam venas per vaporsipo al San Francisko.

D-ro H. W. Yemans, prezidinto de la Sesia Internacia Kongreso, devis reveni al la Filipinaj Insuloj la kvinan de aŭgusto post mallonga vizito al San Francisko. La Kongresa Komitato donis al li akcepton la lundon antaŭ lia forveturo kaj krom la anoj de la San Franciskaj Kluboĵ ĉeestis multaj samcelantoj el Oakland, Berkeley, San Jose, Santa Rosa, Redwood City kaj Alvarado. Ni havis bonan programon kun paroladoj, kantoj kaj soloj. Poste ni servis glaciaĵojn. Dum la restado de D-ro Yemans la T.E.K. Komitato multe kunvenis por interparoli kaj li al ni multe diris pri estintaj kongresoj, ankaŭ donis al ni siajn opiniojn pri niaj subkomitataj bezonoj kaj financaj postuloj. Ne estas necese diri ke ni uzos liajn proponojn, ĉar ni ĉiam deziras kaj petas sugestiojn.

La Loĝada Komitato nun preparas statistikojn pri la prezoj de diversaj hoteloj kaj manĝejoj por estontaj vizitantoj al la Ekspozicio kaj Esperanta Kongreso.

La tuta mondo bonvenigos en San Francisko dum 1915.

A. S. Vinzent



"LA DEKA" (that never was) IN PARIS

(The following reprint from our esteemed contemporary "The British Esperantist", we believe will be of special interest to our readers, giving, as it does, an excellent first-hand account of the circumstances surrounding the disruption of our "Deka".—Ed.)

In the face of the appalling events that have taken place in so short a time, words fail to express one's shock and sorrow, and the horror of all that has and is happening in Europe. The blow that has fallen on the world and Esperantists everywhere came like a thunder-clap, when the sky was blue and the sun shining.

Our sympathies go out to our French Geamikoj, who have worked so long and zealously to make LA DEKA the brilliant success that it promised to become. We feel very sorrowful for our beloved D-ro Zamenhof, and long to know of his safety. For our karaj Esperantistoj-Ciulandaj we feel the deepest sympathy; and last, but not least, we unite with our own President, Mr. Mudie, in mourning over the tragedy which has blighted our most ardent hopes for LA DEKA in Paris.

On August 1, about 3 o'clock, a large party, under the leadership of Mr. A. Gracey, of London, left Victoria Station bound for Paris via Newhaven and Dieppe. Various rumors had been afloat, but they seemed so unbelievable and so unthinkable that only four of the number elected to remain behind. For months past had we not looked forward to this Congress? It was not an occasion to be lightly given up! and we set out full of expectation of a good time. Arrived at Newhaven, and going on board the steamer "Brighton", we heard various accounts of difficulty in getting French money for English; also that some Esperantists had returned from France that way. But we fancied they must be unnecessarily nervous; there would be no difficulty for us at the Akceptejo in getting change! Antaŭen!... Landing at Dieppe we hurried towards the waiting train, getting our baggage chalked without delay as we passed through the "douane"; some, indeed, did not even stop for this, but marched on, and no one said a word! **Oni vidas,**

ke ni estas bonaj Esperantistoj, mi elkpensas! "Did you ever get through the custom-house so easily before?" said a man in the crowd to me, as we proceeded to the train. "I think it must be on account of all these Esperantists," he added, as he saw the green labels all around him. But we were soon undeceived, for conversation in the train with those who had only just been told of the fact, and also the sight of the military on guard, informed us of the truth that French mobilisation had begun. A young French lady told us in broken English that there would be no trains out of Paris after midnight. "Why?" we asked. "Because it is wars, it is wars," she repeated over and over again. "I cannot think why you English are coming to Paris; I come to say goodbye to seven of my relatives who will have to fight."

At Pontoise the driver of the train had conversations with the men guarding the route—at the latter place the raised voices suggested something wrong—but it all ended with a laugh, and to the sound of "Vive l'anglais" we restarted for Paris. The Gare St. Lazare was crowded with people and luggage, but there was a general scarcity of officials and porters. Now we began to realize the difference between a conscription country and our own England. Registered luggage could not be found; at last the party made its way into the street and the rain to two char-a-bancs waiting for "la karavano de Dean & Dawson". Each vehicle was drawn by six beautiful black horses. "We shall be fortunate if we reach the hotel before the horses are requisitioned," remarked someone. Some of the Esperantists had seen Mr. Mudie, who met our train at St. Lazare, to advise us to get back to the station early in the morning to return to England, as no congress could be held. We felt the deepest sympathy with our French samideanoj. After all their efforts for

the DEKA to have to fight instead!

The drive through Paris, dark and deserted, compared with the station, was a contrast to the excursions round the city that had been planned by the Congress! The searchlight from the Eiffel Tower flickered over us, and the river, with its many bridges, looked charming. At last we stopped at the two hotels in the rue Jacob, where the various people found each his or her own destination. The people of the Hotel St. Germain d'Orlean received us pleasantly and gave us supper, of which we were in need. But all were very grave, partly from sympathy with the French, and partly from anxiety as to the possibility of leaving sufficiently early in the morning. "We have twenty-four hours for getting away" was the word passed from one to another. Most went to their rooms to rest for a few hours, if not to sleep. We liked the comfortable old-world hotel, and could have been so happy there during the days of the Congress. A thunderstorm broke over Paris in the early hours, and vivid lightning illuminated our unaccustomed surroundings. Between 6 and 7 o'clock the party began to collect in the vestibule, but it was not easy to discover the others, as we had not as yet learnt their names or number in the hotel. Breakfast, too, seemed unattainable, even unreasonable, after our late, or, rather, very early, meal. Also the proprietors of the hotel had been up all night preparing for their men to leave. One young lieutenant marched out in regimentals to a taxi as we stood round the door waiting for the others.

Many soldiers were going off in the early-morning sunshine; other taxis stood at other doors waiting for other smart young men, who presently were whirled off with a far-away look on their set faces. Little groups passed along stationwards—reservists accompanied by their women-folk, some of whom wore a look of conscious satisfaction in thus being ready to give up their dear ones to the service of their country. Many, doubtless, thus masked their fears—and it struck me as infinitely sad and pathetic. Those who had already parted with their relatives, and had turned to face responsibilities alone, were weeping and red-eyed. Poor Paris! There was no enthusiasm that we saw—they did **not want war.**

Did anyone, except the armament firms?

No vehicles seemed available for us and at last, after a quick breakfast, we tried carrying our own luggage. In vain, for we only succeeded in getting as far as the other hotel, and there we had to wait till presently a taxi dashed up, bringing two ladies to the hotel. Our conductor and party literally "commandeered" that taxi, piling our luggage on it as high as it would go, and Mr. Gracey, springing up by the unwilling driver, accompanied him to the station, while we, thus happily relieved of our burdens, walked the long walk across the city.

Arriving at St. Lazare, we found our difficulties were only beginning. An ever-increasing crowd blocked the entrances to the platforms, and as each, once more, carried his or her own bag or suitcase, the block was formidable; so was the heat! Soon we were hopelessly separated from the others, and it was only by straining every nerve that Miss Staveley and I managed to keep together. At last we were on the platform, having got through the terrible crush at the barrier. Some kindly Americans helped us to find seats in their carriage and to put our bags on the rack. They had come from Switzerland, intending to stay some weeks in Paris; they had been obliged to spend some part of the night on the station, as did many others, and they said it was a pitiable sight to see families seated on the platforms unable to get food for the children, and towards morning things were made much worse by the presence of a lot of drunken people. How well off were we by comparison!

The scenery from Paris, via Pontoise to Dieppe, was very pretty in the sunshine, the brilliant green of pastureland and woods contrasting with fields of golden corn, some of which was cut; but the reapers were off to the war, leaving the grain uncut.

At Dieppe the quayside in front of the "douane" was lined with waiting people, all carrying luggage. Porters, too, had gone, leaving only a few necessary older men to carry on the work. One solitary bell tolled for afternoon service, reminding us suddenly that it was Sunday afternoon, and we watched the little processions of boys and girls, under the care of whitecapped Sisters of Charity, going

to their place of worship. Some of the children were allowed to stand for a few moments to look at the strange sight of so many foreigners waiting for the next boat to take them away from the French shore.

By this time the need for food, and especially for something to drink, became pressing, for the sun was hot. Leaving luggage in the care of those who remained by theirs, we went off to forage; many others had already done the same, and the restaurants were crowded; men waiters had departed, and the waitresses strove valiantly and cheerfully to supply the wants of the invaders—it was necessary to wait one's turn. At last we helped ourselves to bread and cheese the only food within our reach! and when the long-awaited-for "thé" was brought, we had the opportunity of paying for what we had "commandeered"! At a buffet on the quay a quantity of fruit was seized on by hungry travellers, but no one was left in charge to take the money for the same. We supposed that the owner had brought his goods for sale, and been given no time to find a substitute. Such are some of the effects of conscription. Women were allowed to pass the barriers at the stations, and on to the boats, without question; men had to show their passports—partly on account of spies—partly to prevent any Frenchman leaving his country at this time. Again we waited long on the quay for the coming boat. Finally, unearthly noises from the siren told of her approach. Many men were returning to France from England. As the last man stepped off the gangway the crowd began slowly to move on to it, and for two hours they filed on with their luggage—examination of pas-

ports causing much delay. Laden to the utmost, the boat moved from the quay a short distance; then began the work of taking off the luggage brought, and putting on more—a slow business with the crane. Meanwhile we stood on deck scanning the faces of the still-increasing crowd on the shore; to our joy we espied six of our party who had missed the train at St. Lazare—they signalled that they were coming by another boat. (There were two more boats that evening, and we heard afterwards of their safe arrival by the last one).

About 6.30, in brilliant sunshine, which glorified the quaint old town, we looked our last at the white cliffs of Dieppe, and at the various groups here and there on the landing stages, who waved and shouted "Vive l'Angleterre." Soon the choppy sea and the weariness of it all, and the disappointment and sorrow, and want of food, had their effect on the crowded shipload of passengers; very few, if any, altogether escaped seasickness. I overheard a few words between two gentlemen: "I have crossed the Atlantic twenty times and never saw anything like this before," as he glanced hurriedly round on his fellow travellers. "And I have never felt like this before," said the other, as he gazed out to sea, while I heartily sympathised with the tone of self-dissatisfaction in which he said it, as we, too, gazed out to sea!

By the time Newhaven was reached we were quite exhausted, and if it had not been that we were on free, and not conscription, soil, and so that the help of a porter was available to carry our bags and conduct us to the train, we might "have been there still."

E. Miller.

SUR NIA TABLO

Dank' al la generala militfrenezeco inter niaj transoceanaj nacioj nia ricevo de alialandaj gazetoj estas tre malgranda. Krom la nereguleco de la poŝto, internaj kondiĉoj devas malhelpi, aŭ almenaŭ prokrasti la eldonon de multaj el ili. Ne estas necese konsili niajn legantojn ke ili estu paciencaj rilate la nericevon,—aŭ pro-

krastitan ricevon de la abonitaj de ili Eŭropaj gazetoj. Se tio ĝenas al ili, ĝi duoble ĝenas al la diversaj redakcioj.

Inter la kelkaj akurate ricevitaj eldonadoj estas la 18a kaj 19a numeroj de "The Esperanto Monthly". Zorga tralegado de ili reportas al nia atento la gravecon kaj unikecon de tiu eldo-

najo. Grava respondecio restas al tiu, kiu pretendas instrui la Esperantistajn infanojn, ĉu junaj pro jaroj, ĉu pro mallonga studado de la lingvo. Mallernado de eraro estas dufoje tiel malfacila kiel lernado de vortoj. Tial, inter la multaj kaj diversaj fakoj de la "Monthly", ni turnu precipe al la konsilo al lernantoj. Tiu fako rimarkinde enhavas ekzemplon pri tradukado de anglaj frazoj en esperantaj frazoj. De komenco ĝis fino ĝi silente diras "ne provu transporti la precizajn vortojn kaj frazmanierojn, sed, analizu la signifon de la frazo, aŭ vorto, kaj precize esprimu ĝin per taŭgaj esperantaj vortoj kaj frazoj; nur tiamaniere povos oni verki aŭ bonstile, korekte, aŭ eĉ tute kompreneble."

Malgraŭ la generala bonegeco de la dirita fako, ni trovas en ĝi kelkajn evitindajn vortojn kaj esprimojn. "Ĉu vi **amas** veturi per vagonaro." Oni **amas** Dion, gepatrojn, landon, eĉ eble florojn, sed estas sufiĉe ke oni **ŝatu** la pliparton da nevivantaj objektoj, amuzajoj, ktp.

"Diligentu kaj finu vian taskon." En nia kolekto da vortaroj ni povas trovi nenian aŭtoritaton por verba uzo de la radiko "diligent". Laŭ nia esploro, "aldoniteco" signifas "addiction to" tute malsama ideo de "devotion". Kial ne "sindoneco"? Certe, en nia literaturo oni plej ofte trovas tiun vorton, tiurilate.

Eble "recumbent" estas "malstara", sed, "malstara" ne ĉiam estas "recumbent". Sidanta, kuranta, naĝanta per-

sono estas "malstara".

"Ĉu vi bonvolu instrui min, ktp." Kial ne "bonvole instruos", "bonvolos instrui", anstataŭ la uzita frazo? Kian aŭtoritaton por "bonvolu instrui"?

En la instrua kaj interesplena artikolo pri la "Brita Kverko" (paĝo 99) oni "tranciĝis el la ŝelo ĉefliterojn de la amatino". Tio estas ja ebla, sed pli kredeble oni tranciĝis la literojn "en la ŝelojn". "Ili faris veturilojn de puŝal ŝarĝ-". Ĉu ne "ĝis" anstataŭ "al"?

La ambaŭ numeroj enhavas multon pri Esperanto kaj la Knabskoltoj, eĉ speciala ekzercaro por Skoltoj (paĝo 97) kies anglalingva ŝlosilo sin trovas je la fino de la gazeto. En ambaŭ estas bonegaj modeloj de komercaj leteroj; la tre legindaj leteroj de "Uncle Bill"; novaĵoj pri la esperanta movado, ktp.

La "July-August" numero enhavas bonegan tradukon de la angla klasiko, "The Spider and the Fly". La tradukinto konservas la originalan ritmon, samtempe evitante trouzodon de tiu malbenajo al esperanta poezio, — la abomeninda apostrofo. Gratulojn al la verkisto kiu povas esperantigi anglan poezion, tiamaniere ke oni ne devas ruĝiĝi pro la ofta lameco de tiaj provoj.

Resume, "Esperanto Monthly" estas tro valora gazeto ke ĉiu angle parolanta Esperantisto ne devu meti ĝin inter siajn abonajojn. La abonprezo estas malgranda, kaj oni povas ankoraŭ pli malaltigi ĝin per kunabono kun **Amerika Esperantisto**.

KRONIKO NORDAMERIKA

ANNAPOLIS, MD. La tagjurnalo "Evening Capital", kiu jam multfoje reklamis nian aferon, en antaŭa ne longa eldono, presis bonan artikolon pri nia Deka Kongreso. Oni povas danki, kompreneble, la senlacan samideanon, Pastro Smiley, pro la reklamado.

ATLANTA, GA. Ĉe la Internacia Kongreso de la Disciploj de Kristo, kunvenanta en ĉi tiu urbo dum la semajno, Okt 7—14, oni petas ke ĉiuj Esperantistaj vizitantoj vizitu la Esperanta delegito en la urbo—D-ro Cecil Stockard, 909 Empire Life Bldg. D-ro Stockard jam anoncas per la urbtajurnaloj, ke li deziras renkonti

ĉiujn de la Esperantistoj, kaj ankaŭ ĉiuj kiuj estas interesataj pri la internacia lingvo. Li esperas fari multe da propagandado dum tiu semajno kaj ni deziras al li plej bonan sukceson.

CINCINNATI, O. Dum la pasinta monato, la loka societo bonvenis al la urbo, bonekonatan samideanon, S-ro T. W. Palmer el Philadelphia, kiu vizitis ĉi tie survoje al San Francisco. Ĉar S-ro Palmer nur restis dum malmulte da tempo, oni ne povis fari por li tiel multe kiel estas dezirita.

Per la penadoj de S-ro E. H. Becker, kiu estis la delegito de la Cincinnati Societo al la Sepa en Chicago, la

plej grava loka tagjurnalo presis bonan artikolon pri la Kongreso,—speciale pri la sukceso de la opero "Galeto".

COLO. SPRINGS, COLO. Post kelkaj monatoj de dormado, la loka grupo Esperanta vekigis, kaj multe

laboras. Ni gratulas ilin ke ilia sekretario, S-ro J. T. White, 410 Colo. Bldg., estas la unua kiu sendis grupkotizajojn al la Centra Oficejo de E. A. N. A. por la nuna jaro. Ni esperas ke ili daŭrigos la bonegan laboron jam komencitan.



NOVAJ LIBROJ

PRINCO VANC'. 35 cendoj; tole bindita, 75 cendoj.

Nuntempe, por esti valora, libro esperanta devas plenumi du kondiĉojn; unue, la originalo (se la libro estas traduko) devas enhavi veran literaturan meriton; due, la Esperanto devas esti pli ol ordinare bona, se oni volas ke la libro trovi lokon inter la daŭranta literaturo de la lingvo. Princo Vanc', laŭ ambaŭ kondiĉoj, meritas altan lokon en nia ampleksa esperanta biblioteko.

La originalo estas el la plumo de Profesoro Arlo Bates, kun la kunlaborado de lia edzino, kaj aperis antaŭ multaj jaroj. Prof. Bates jam de longe estas ĉefo de la angla fako ĉe la "Massachusetts Institute of Technology," kaj estas fama pro sia bonega stilo kaj la pureco de la angla lingvo sia. La libro estas feina rakonto, sprita, fantazia kaj plena je strangaj aventuroj de la juna princo, kaj pro tio, kaptas kaj tenas la intereson de la juna leganto. La pliaĝa leganto trovas tute tra la rakonto, subtravolon da filozofa, kaj duoble ĝuas la legadon.

La tradukinto, S-ro Harris, estas unu el la plej spertaj el niaj usonaj Esperantistoj, kiel ankaŭ unu el la pioniroj de la afero en nia lando. Ne sole li donas al ni tute puran kaj facile legotan tekston, sed li samtempe konservas la stilon de la geaŭtoroj, trovitan en la originalo, kiel mirinde nur tiu scias, kiu povas kompari la tradukon kun la originalo.

Princo Vanc' meritas, kaj sendube trovos lokon inter la klasikoj de es-

peranta literaturo. Ĝi havas duoblan intereson al la usona studento pro la fakto ke la angla eldono estas malofta, kaj nur la esperanta teksto povas esti facile aĉetata.

NATURAL EDUCATION, Winifred Sackville-Stoner. (In English). Bobbs Merrill Co. \$1.00.

In this day of bottle-fed and kindergarten educated babies it is refreshing to meet a real mother, who understands her own child and has the ability and the patience to be its first instructor, and its companion always. While it is not given to all mothers to so completely form the foundation of the education and character of her child as was the case with the author, every mother can do for her child at least a part of what Mrs. Stoner has done for her daughter. There is so much in this book that were we to single out certain parts of it for special review we should fail absolutely in conveying an idea of its real merit. Every mother who reads it cannot fail to be a better mother,—and her child, or children will gain from such reading. It contains hundreds of valuable suggestions in child education and physical development. Its list of ten "nevers" is worth its price. Whether one agrees with its methods in every particular, or whether one has the ability to follow all its suggestions, an irreparable wrong is being done to the child whose parental five-foot-shelf does not contain a well-thumbed copy of Natural Education.

LA KARAKTERO DE LA VULPHUNDETO

De Jerome K. Jerome

Ni ellitigis frue en la mateno lundon ĉe Marlow', kaj iris por nin bani antaŭ la matenmango: kaj, je la reveno, mia hundeto, Montmorency', farigis per si mem treega sensagulo. La sola temo pri kiu Montmorency' kaj mi posedis iun grandan diferencon de opinio estas katoj. Mi ametas katojn: Montmorency' ne.

Kiam mi renkontas katon, mi diras, "Kompatinda kato!" kaj kliniĝas kaj tiklas unu flankon de ĝia kapo: kaj la kato rektigas la voston, laŭ rigida, fanditfera maniero, kurbigas la dorson, kaj viŝas la nazon kontraŭ mia pantalono: kaj ĉio estas ĝentileco kaj paco. Kiam Montmorency' renkontas katon la tuta strato scias pri la afero: kaj sufiĉe da malbona lingvo malŝpariĝos dum dek sekundoj por provizi ordinaran respektindan viron dum la tuta vivado, se li zorgplene uzas ĝin.

Mi ne malaprobas la hundon (kontentante min, ordinare, nur frapante lian kapon aŭ jetante al li ŝtonetojn), ĉar mi komprenas ke tio estas lia naturo. Vulphundetoj naskiĝas kun preskaŭ kvaroble tiom multe da originala peko kiom aliaj hundoj, kaj postulos jarojn kaj jarojn da pacienca penado de ni Kristanoj liveri iun videblan reformon en la petoleco de la vulphundeta naturo.

Ni estis kiel mi diris, revenanta de promenado, kaj je la mezo laŭ longeco de High strato, kato ekkuris el unu el la domoj antaŭ li, kaj komencis troti trans la vojon. Montmorency' faris krimon de ĝojo—la krimon de la fiero soldato kiu vidas sian malamikon transdonata en siajn manojn—la specon de krio kiun Cromwell povus elkrii kiam la Skotoj malsuprenvenis laŭ la monteto—kaj kuregis post sia ĉasajo.

Lia venkonto estis granda nigra virkato. Neniam mi vidis pli grandan katon, nek katon kun malpli respektinda aspekto. Ĝi jam perdis duonon de la vosto, unu el la oreloj, kaj parton de la nazo. Ĝi estis longa, tendenoplena, aperanta besto. Ĝi posedis trankvilan, kontentan mienon. Montmorency' iris al tiu kompatinda

kato po dudek mejloj hore; sed la kato ne atentis, ne ŝajnis posedi la ideon ke oni danĝerigas al ĝi la vivadon. Ĝi trotis kviete for dum ĝia atencento alproksimiĝis ĝis metro malproksime de ĝi, kaj tiam ĉirkaŭturniĝis kaj sidigis meze de la strato, kaj rigardis Montmorency'n kun ĝentila demandanta esprimo, kiu ŝajnis diri, "Jes! Ĉu vi min deziras?"

Montmorency' ne malposedis bravecon: estis ĉio en la aspekto de tiu kato kio povus malvarmigi la koron de la plej brava hundo. Li tuj haltis, kaj rigardis la virkaton.

Neniu parolis; sed la interparolado kiun oni povis imagi estis klare kiel sekvas:

La Kato: "Ĉu mi povas por vi ion fari?"

Montmorency': "Ne — Ne, dankojn."

La Kato: Ne atendu demandi, se vi efektive ion ajn volas, vi scias."

Montmorency': (malantaŭenirante laŭ High strato): "Ho ne — tute ne — certe — ne vin ĝenu. Mi — mi timas ke mi eraris. Mi pensis ke mi vin konis. Malĝojigas min ke mi vin distris."

La Kato: "Tute ne — granda plezuro. Ĉu certe, ke vi nuntempe ne volas ion ajn?"

Montmorency' (ankoraŭ malantaŭenirante): "Tute ne, dankojn — tute ne — tre bonvole de vi. Bonan matenon."

La Kato: "Bonan matenon."

Tiam la kato supreniĝis kaj daŭrigis sian trotadon; kaj Montmorency', metinte tiun kiun li nomas sia vosto zorgplene en ĝian propran sulkon, revenis al ni, kaj restis laŭ malgrava vico ĉe la malantaŭo.

Ĝis ĉi tiu tago, se oni al Montmorency' diras la vorton "Katoj!", li videble malgrandiĝas kaj kompatinde rigardas supren al la parolanto kvaŭaŭ li diras,

"Bonvole ne!"

El la angla tradukis,

F. H. Battey

ORDER BLANK

The American Esperantist Co., Inc., West Newton, Mass.

Please send me at once, to above address, the books, etc., checked below, for which I enclose the sum of \$.....

Name

Address

Year's subscription to the monthly magazine, AMERIKA ESPERANTISTO, \$1.00	
AMERICAN ESPERANTO BOOK, cloth binding, with vocabularies, \$1.00 postpaid	
COMPLETE GRAMMAR OF ESPERANTO (Kellerman), with vocabularies, \$1.25 postpaid	
Combination of one year's subscription to AMERIKA ESPERANTISTO with cloth bound copy of the AMERICAN ESPERANTO BOOK, \$1.50	
Combination of one year's subscription to AMERIKA ESPERANTISTO with copy of COMPLETE GRAMMAR OF ESPERANTO, \$2.00	

APPLICATION FOR MEMBERSHIP

Fill out this application legibly and mail to Dr. C. H. Fessenden, General Secretary, The Esperanto Association of North America, Newton Centre, Mass.

I hereby apply for membership in **The Esperanto Association of North America**, and indicate by placing **X** in the column at the right the extent to which I will be able to cooperate in the work of said Association.

Name

Address

Active Membership, 50 cents enclosed	
Special Membership, \$2.50 enclosed	
Sustaining Membership, \$10.00 enclosed	
Life Membership, \$100.00 enclosed	
I am eligible for membership in the Students Esperanto League	
I shall be glad to assist in the work of propaganda, and wish you to notify the nearest propaganda leader of the Association	
The following information is requested but not obligatory	
Age	Occupation Birthplace
If of any linguistic division, as German-American, Bohemian-American, etc., please state here:	

BUY BOOKS WITH A

COUPON TICKET

\$5.50 IN COUPONS FOR \$5.00

SAVE MONEY!

SAVE TIME!

Quick and convenient—if you want four books, worth \$2.10, you just cut off \$2.10 in coupons, and mail them with your order. If, as sometimes happens, the 20-cent book is out of stock—back comes a 20-cent string of coupons and the transaction is closed! No waiting at the post office window for a money order! No danger of cash being lost in transit.

Do WE lose anything on this?—Nay, Nay, Pauline—It's the CONVENIENCE!! Why, it's SO convenient that it makes ordering books a positive pleasure.

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., INC.

West Newton, Mass.

A FEW OF OUR LEADING SPECIALTIES

Any of these sent post paid on receipt of price. See April, May and June, 1914 *Amerika Esperantisto* for full descriptions.

PENCIL SHARPENER Neatly boxed, with directions,	10c.
KNIFE SHARPENER Neatly boxed, with directions,	10c.
CIGAR HOLDER Aluminum, with mouth piece of sweet wood—the best yet,	10c.
PIPE CLEANER The neatest thing out—will not cut the wood,	5c.
KEY RING The handiest ever,	5c.
POCKET LIGHTER Turn the wheel—It lights! Invaluable to smokers,	25c.
MAGIC HOUSEHOLD LIGHTER Does away with matches, Zipp—It Lights!	25c.
GAS LIGHTER Invaluable for lighting gas stoves and auto lamps. Turn the wheel—It lights!	25c.

MODOC SALES COMPANY
West Newton, Mass.

Annual Inventory Sale

At our annual round-up of stock, we find the following books which for various good reasons we wish to close out, — i.e., some, we are no longer listing in our catalogs; some are out of print; of some we have too few; of some we have too many; and some others we wish to clear out in order to make room for new stock. This offer is for a limited time, and it will pay you to take advantage of this excellent opportunity to stock up on miscellaneous reading matter for the winter season. When ordering specify second choices in the event that some one beats you to it.

Contents of all books guaranteed **positively perfect**.

Dividend discount tickets, coupon tickets and postage stamps NOT accepted on this lot, nor will orders for less than 50 cents be filled at these special prices.

(For descriptions, see regular issues of A. E.)

	Special		Special
Cox Grammar, \$.75	.65	Iĝenio en Taŭrido, .55	.48
Grammar (Geoghegan), .50	.25	Infano, Saĝulo, ktp., .15	.10
Ekzercoj de Aplikado, .28	.24	Inter Blinduloj, .53	.40
Kurso Tutmonda, .25	.20	Internacia Organizado, .10	.07
Matematika Terminaro, .22,	.17	Internacia Legolibro, .35	.27
Muzika Terminaro, .17	.10	Kaatje, .60	.52
Cours Methodique, .38	.32	Karlo, .15	.10
Recueil de Phrases, .55	.48	Kaŭzo de la Senlaboreco, .35	.28
Anfangsgrunde der Esp., .13	.10	Kie estas la Eklezio, .40	.30
Primo Manuale della Ling., .05	.03	Kiel Plaĉas al Vi, paper, .35	.30
Abatejo de Westminster, .15	.10	Kolorogisto Aerveturanto, .14	.10
Alad'n aŭ la Mirinda Lampo, .18	.14	Komerca Sekretario, .17	.13
Aladino kaj Palomido, .25	.15	Komercaj Leteroj, .15	.12
Ali Baba, .14	.11	Kondukanto & Antologio, .49	.38
Ama Bileto, .15	.10	Kristana Kantareto, .10	.07
Angla Lingvo sen Prof., .30	.24	Kvarvoĉaj Kantoj, .15	.08
Antaŭdiro, .16	.12	Kverko kaj Floro, .40	.28
Avarulo, .20	.15	Laŭroj, .50	.40
Brazilio, .40	.32	Libreto pri Transmorta Vivo, .22	.17
Bruna Lilio, .06	.04	Libro de l'Humoroj, .60	.50
Bukedo, .50	.40	Libro de Kantoj, .10	.06
Cikado ĉe Formikoj, .20	.16	Literatura Almanako, .85	.70
La Devo, .25	.15	Manon Lescaut, .70	.55
Diversaĵoj, .45	.36	Mistero de Doloro, .50	.35
Don Juan, .39	.33	Misteroj de Amo, .32	.25
Du Rakontoj, .11	.08	Monadologio, .16	.12
Dua Kreinto, .05	.03	Nevo kiel Onklo, .28	.20
Eĉ en Doloro, .30	.23	Ni Sekvu Lin, .30	.24
Edziĝo Kontraŭvola, .17	.13	Nigra Galero, .35	.28
Ehoj el Manila, .55	.40	Ondino, .35	.28
Elektritaj Fabeloj, .18	.13	Ornitologia Vortaro, .75	.30
"Ĝipelu Lin," .19	.12	Parizaneto, .34	.28
Eneido, .80	.70	Parizina, .15	.12
Esperantaj Prozaĵoj, .60	.50	Paŭlo kaj Virginio, .30	.15
Estu Homol, .50	.40	Perfekta Kuiristino, .15	.12
Frazlibro de l'Turisto, .20	.16	Petaloj, .20	.15
Frenezo, .29	.23	Pola Antologio, .58	.45
Ginevra, .25	.20	Portreto, .35	.28
Ĝis la Revido, .05	12 for .25	Poŝkalendaro, 1914, .35	.20
Halka, .29	.24	Protesilas & Laodamia, .35	.28

	Special		Special
Provo de Marista Term., .46	.38	Sufero, .30	.22
Rakonto & Aventuro, .10	.05	Tekstaro de Konataj Kantoj, .10	.05
Rakontoj al mia Belulino, .55	.46	Tra l'Silento, .40	.32
Rakontoj pri Feinoj, .30	.24	Trezoro de la Sorcistoj, .37	.30
Rememoro pri Solferino, .25	.18	Tri Mortoj, .15	.10
Rolandkanto, .45	.36	Tutmondaj Fajrkutimoj, .11	.06
Rompantoj, .30	.22	Urso, En Montoj, .45	.36
Salome, .30	.22	Unuaj Agordoj, .10	.07
Si Klinigas por Venki, .45	.35	Ventego, .75	.50
Sub la Meznokta Suno,		Verda Kakatuo, .50	.41
paper, .35	.25	Verdaj Fajreroj, .20	.15
cloth, .50	.40	Versaĵoj en Prozo, .32	.25
Sur Vojo al Kunfratigo, .55,	.40	Virineto de la Maro, .35	.25
(Esperanto & Russian)		Vivo de Jesuo, .75	.40

Special Subscription Offers

As an opening to our Fall subscription business, we are able to offer you the following special prices on favorite popular magazines — if two or more are ordered at the same time. If you do not find the magazine you want listed here, write us for other special offers which we have not space to print.

REMEMBER: For a limited time only, and not less than TWO to an order, at these prices!

Popular Fiction	SPECIAL PRICE	SPECIAL PRICE	SPECIAL PRICE
AMERICAN MAGAZINE, 1.50,	1.15	BUSINESS PHILOSOPHER, 2.00	1.50
BLUE BOOK, 1.50	1.35	CAMERA CRAFT, 1.00	.85
DELINEATOR, 1.50	1.15	COUNTRY LIFE IN AMERICA	
EVERYBODY'S, 1.50	1.25	4.00	3.50
LADIES' WORLD, 1.00	.65	ETUDE, 1.50	1.25
McCLURE'S, 1.50	1.15	MEDICAL REVIEW OF REVIEWS,	
METROPOLITAN, 1.50	1.15	2.00	1.15
MOTION PICTURE MAGAZINE, 1.50	1.25	MODERN PRISCILLA, 1.00	.85
RED BOOK, 1.50	1.15	MOTOR LIFE, 1.50	1.15
SCIENTIFIC, PROFESSIONAL AND		REVIEW of REVIEWS, 3.00	1.75
MISCELLANEOUS		SCIENTIFIC AMERICAN, 3.00	2.75
AMERICAN POULTRY JOURNAL,		WIRELESS AGE, 1.50	1.15
1.00	.85	WOMAN'S JOURNAL, 1.00	.85
		(The Suffrage Weekly)	

The American Esperantist Co., Inc.,
West Newton, Mass.

Subscription Dept.: Please enter my subscriptions for the following magazines, for one year, in response to your special offers:

..... \$.....
 \$.....
 \$.....
 I enclose remittance of \$.....

Name.....

Address.....

Date.....